



VT 46 - MARS 2019

la verda Triskelo



2 numéros par an, parution :
Printemps-Automne

Le 24 MARS
Assemblée Générale
à
LOUDEAC
(voir pages 3, 4 et 5)

Legu pri la
okazontaĵoj

Agenda au verso

9-a PRINTEMAS
26 aprilo-4 majo en Gresillon
Por lerni aŭ por lerni kiel instrui E-on!
KER ekzamenoj la 3-an+4-an de majo

Enhavo

| | |
|----------------------------------|-------------------|
| • <i>Edito</i> | <i>p. 2</i> |
| • <i>La Federacio</i> | <i>p. 3,4</i> |
| • <i>Rakonto</i> | <i>p.5,6</i> |
| • <i>El Vannes kaj Aŭstralio</i> | <i>p. 7</i> |
| • <i>Armor Esperanto</i> | <i>p.8</i> |
| • <i>El Guingamp</i> | <i>p. 9</i> |
| • <i>El niaj kluboj</i> | <i>p.10</i> |
| • <i>Anonco</i> | <i>p.11</i> |
| • <i>Vojaĝo al Ĉinio</i> | <i>p.12, 13</i> |
| • <i>El niaj kluboj</i> | <i>p. 14, 15</i> |
| • <i>Vojaĝo al Hindio</i> | <i>p.16,17,18</i> |
| • <i>Poezio tut'libera</i> | <i>p.19</i> |
| • <i>Agendo</i> | <i>p.20</i> |

Cotisation 2019

y avez-vous pensé ?

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif,
soutenez l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous appartenez à un club, pour ad-
hérer à la fédération uniquement adressez-
vous à Xavier Godivier, *coordonnées p.2.*

Aux internautes

Site Internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org/>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio, et ainsi recevoir des nouvelles, plus
fraîches et plus nombreuses, envoyez un
message vide à l'adresse :

bretonio-subscribe@yahogroupes.fr

Redakcio : Jannick Huet-Schumann - 02.99.83.69.86 - huet.jannick@gmail.com - 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné
N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT
(par courrier ou par internet).

E D I T O

Esperanto altvalora lingvo de komerco!

Mi esperas ke plej multaj bretonoj ĝuis aŭ baldaŭ ĝuos unu el la prelegoj de nia nuntempa ĉina vizitanto Ĉielismo.

Lia prelego en Rennes pri Internacia komercado per Esperanto estis por mi okazo konscii pri specifa valoro alportita de Esperanto pri kiu ni ne sufiĉe konscias. Ĉielismo tre bone raportas pri la avantaĝo de Esperanto kiel "lingvo de fido" en rilatoj dum vojaĝoj kaj ankaŭ en profesiaj rilatoj.

La kialo estas ke Esperanto ne estas nur lingvo sed ankaŭ "idealismo". Dank'al tio Esperanto alportas ne nur komunan komunikilon sed ankaŭ bazon de komunaj valoroj. Ni jam konscias pri tio uzante Esperanton en amikaj rilatoj sed Ĉielismo klare montras per sa profesia uzo de Esperanto, ke ĝi povas fariĝi altvalora en la komerca medio, kie fido kaj sekureco de la rilatoj etas tre gravaj atutoj.

Esperanto estas do altvalora komerca ilo, ĝis nun tre malmulte uzita. Do se vi emas riĉiĝi... entreprenu en Esperanto!

Kaj por scii pli pri tiu temo kaj pri Esperanto en Ĉinio, nepre venu al nia membrokunveno en Loudéac, dimanĉon la 24a de marto por plia prelego de Ĉielismo!

Xavier Godivier

L'espéranto, un formidable atout pour le commerce !

J'espère que la plupart d'entre vous aurez eu l'occasion d'assister à l'une des présentations de notre visiteur chinois actuel Ĉielismo.

Sa conférence à Rennes sur le commerce international par l'espéranto fut pour moi l'occasion de réaliser une valeur spéciale apportée par l'espéranto dont nous n'avons pas suffisamment conscience. Ĉielismo nous rapporte en effet son expérience de l'espéranto comme « langue de confiance » dans les relations lors de voyages et aussi lors de relations professionnelles.

La raison est que l'espéranto n'est pas seulement une langue mais aussi un « idéalisme ». Grâce à cela l'espéranto n'apporte pas qu'un outil de communication commune mais aussi une base de valeurs communes. Nous avons déjà conscience de cela lors de notre utilisation amicale de l'espéranto mais Ĉielismo nous montre par son utilisation professionnelle de l'espéranto que cela en fait un atout de premier plan dans le milieu du commerce.

L'espéranto est donc un outil de très grande valeur dans le monde des affaires, outil clairement sous-utilisé jusqu'à maintenant. Alors si vous voulez vous enrichir... entreprenez en espéranto !

Et pour en savoir plus sur ce sujet et sur l'espéranto en Chine, ne manquez pas notre réunion annuelle à Loudéac, dimanche 24 mars pour une autre conférence de Ĉielismo !

Xavier Godivier

Responsables des clubs (ou antennes) bretons

| VT sendado | Manjo Clopeau 12 rue de la Drisse 56450 Theix | 02.97.68.98.57 | manjo.clopeau[ĉe]wanadoo.fr |
|-----------------------------|--|----------------|--------------------------------|
| Armor-Esperanto (St Brieuc) | Jérôme Caré | 07.82.19.62.71 | jerome.care[ĉe]me.com |
| Hennebont | Yvette Veslin | 02.97.36.08.75 | herve.veslin[ĉe]orange.fr |
| Lorient | Anne Georget | 02.97.64.30.39 | anne.georget[ĉe]wanadoo.fr |
| Plouézec | Jeanne Pouhaër | 09 62 30 40 05 | jeanne.pouhaer[ĉe]orange.fr |
| Guingamp | Anne Desormeaux | 02.96.35.83.25 | anne_desormeaux[ĉe]yahoo.fr |
| Morlaix | Nicole Rizzoni | 02.98.88.62.57 | nicole.rizzoni[ĉe]wanadoo.fr |
| Vannes | Elisabeth Le Dru | 06.21.07.11.09 | ledruelisabeth[ĉe]gmail.com |
| Rhuys | Francis Desmares | 02.97.26.89.96 | sicnarf56[ĉe]free.fr |
| Pontivy | Marielle Giraud | 02.97.27.76.98 | liber.terre[ĉe]wanadoo.fr |
| Rennes | Xavier Godivier | 09.53.17.02.55 | zav[ĉe]esperanto-panorama.net |
| St Malo | A-Marie Argney | 02.99.40.24.86 | amargney[ĉe]wanadoo.fr |
| Plestin les Grèves | Étienne de St Laurent | 02.96.35.76.64 | etienne.dsl[ĉe]wanadoo.fr |
| Collinée | Pierre Cardona | 02.96.30.23.94 | kortep[ĉe]gmail.com |
| Dinan | Philippe Stride | 02.96.27.87.43 | philippe.stride[ĉe]gmail.com |
| Montfort-sur-Meu | Josette Ducloyer | 02.99.09.71.92 | jpducloy[ĉe]club-internet.fr |
| Querrien | Françoise Noireau | 06 09 12 03 74 | desirdapprendre@gmail.com |
| Herbignac | J-Y Santerre Duret | 02.40.88.96.98 | jys.mys[ĉe]club-internet.fr |
| Saint Aignan de Grand lieu | Solange Goan | 02.40.31.02.56 | sgoan[ĉe]club-internet.fr |
| Nantes | Lucette Echappé | 02.40.04.46.02 | lucette.lumeto[ĉe]laposte.net |
| St Nazaire | Chantal Barret | 02.40.01.97.27 | patchdomo[ĉe]yahoo.fr |
| Couëron | Luc Gouverneur | 06 30 03 00 98 | coueron-esperanto[ĉe]orange.fr |

F e d e r a c i o

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE DU DIMANCHE 24 MARS 2019

de 9h00 à 16h30 à la salle Malivel de Loudéac

Rappel de l'ordre du jour:

9h00 Accueil

9h30 –10h30 mot du président , approbation des rapports d'activité et financier 2017, **élection tiers sortant du CA**

10h30-12h30 présentation des actions locales créatives

12h30 Repas,

13h30 temps libre

15h- 16h30 conférence de **ĈIELISMO** notre invité chinois « **Esperanto en Ĉinio** »

16h30 fin de la journée

Libroservo toute la journée

Agadraporto 2018 (por la federacio)

Lokaj grupoj

Côtes d'Armor : Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec.

• **Finistère** : Douarnenez, Landerneau, Querrien.

• **Ille-et-Vilaine** : Rennes, Montfort, St Malo

• **Morbihan** : Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient. Pluvigner

• **Loire-Atlantique** (kunlaboro kun la lokaj kluboj): Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu.

Membraro

Oni observas daŭran malrapidan malkreskon de pluraj jaroj kun **155** membroj ĉi jare kun malmulte da novaj membroj, montrante ke plej multaj membroj estas « kernaj membroj » de la lokaj asocioj.

Federaciaj agadoj

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo*

20-paĝa, 2 foje jare aŭtune kaj printempe, kun artikoloj proponitaj de la membroj de la diversaj lokaj kluboj, redaktoro: Jannick Huet.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/> :

administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.

Reta diskutlisto de la membroj:

bretonio@yahoogroupes.fr :

kun 280 abonantoj, ĉirkaŭ 200 mesaĝoj ene de 2018, administrata de kvar volontuloj.

Organizo de prelegturneoj

Du ĉefaj turneoj okazis dum 2018 en Bretonio.

Unua estis organizita de Josette Ducloyer por la FEB : Nijole Stakeniene, de Litovio, rondvojaĝis de la 3a de aprilo ĝis la 27a de aprilo en Montfort, Rennes, Pleugueneuc, St Malo, St Brieuc, Lannion, Douarnenez, Hennebont, Vannes, Sarzeau, Nantes, St Aignan, Grésillon, kun granda sukceso. Ŝi parolis pri Litovio kaj rilatoj kun Eŭropa Unio.

Dua prelegturneo estis organizita dum majo de Yves Nicolas por Esperanto-France : Normand kaj Zdravka de Kebekio estis en Nantes, Douarnenez, Plouezec, St-Malo kaj Rennes. Zdravka prelegis pri sia propra sperto kiel enmigrinto kaj Normand prezentis profesian analizon pri la rilato de la homaro kun la arbaroj.

Okazis ankaŭ vizito de Dennis Keefe en Vannes.

Rilatoj kun Esperanto-France, Josette Ducloyer reprezentas la FEB-on ĉe UFE, tri aliaj membroj de la federacio estas ankaŭ UFE-komitatoj, du kiel reprezentantoj de membroj de UFE, kaj unu kiel reprezentanto de GEE.

Jara kunveno en Loudéac la 25an de marto 2018
43 ĉeestantoj, veno de ĵurnalisto de « Télégramme de Brest ».

- *Matena programo* : Post la laŭstatutaj devoj de la kunveno, pluraj intervenoj estas proponitaj pri « Kiel interesi novajn homojn al Esperanto » kun diversaj spertoj : funkciado de nova grupo en Pluvigner, fino de la kursoj en Ensac de Lannion, daŭrigo de la kurso en Université de Lorient, kurso en mezlernejo de Guingamp kaj sperto pri Tap (temps d'activités périscolaires) en Sarzeau. Debato kaj teatra ludado por ekzerci pri Esperanto-informado al scivolemaj aŭ kritikemaj personoj.

- *Posttagmeza programo* : Kantoj de la koruso Interkant kaj teatraĵo prezentita de membroj de Esperanto-Vannes, kun la komedio « Amo ĉe la pordo ».

Agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio :

Kursoj de Esperanto : Kursoj kaj konversaciaj rondoj estas proponitaj en 15 urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Detaloj pri ĉiuj kursoj estas ĉiu-jare disdonitaj en la aŭtuna revuo de la federacio, Verda Triskelo, VT45 por ĉi-jare, konsultebla en la ttt-ejo de la FEB.

Pli detala raporto pri la lokaj asocioj estos prezentita okaze de la venonta memborkunveno de la federacio en marto kaj konsultebla en la TTT-ejo de la federacio..

F e d e r a c i o (s e k v o)

Rapport financier exercice 2018

Débits

| | 2018 | 2017 |
|------------------------------|-------------------|-------------------|
| 6063 valise audiovisuelle | 0 | 160,49 € |
| 613 locations | 258,28 € | 258,68 € |
| 616 assurance | 61,48 € | 58,99 € |
| 6237 edition | 320,72 € | 481,08 € |
| 625 tournées | 219,60 € | 482,07 € |
| 6251 frais déplacements | 78,65 € | 109,50 € |
| 626 frais d'affranchissement | 74,16 € | 68,49 € |
| 6571 examens et stages | 167,50 € | 234,00 € |
| 66 frais bancaires | 8,10€ | 13,50 € |
| Total | 1 188,49 € | 1 866,80 € |

Crédits

| | 2018 | 2017 |
|--|-------------------|-------------------|
| 707 vente de livres | 0 | 60,80 € |
| 756 cotisations | 1 777,80 € | 1 363,00 € |
| 7561 participations tournées ext. bretagne | 0 | 60,00 € |
| 7585 Dons reçus | 77,10 € | 0 |
| 758 Revenu d'intérêts livret CMB | 36,72 € | 36,45 € |
| Total | 1 891,62 € | 1 520,25 € |

Compte de résultat

| | |
|---|----------|
| Produits 2018 à recevoir en 2019 de Eo France | 427,80€ |
| Charges 2018 payées en 2019 | 159,04 € |

| | 2018 | 2017 |
|--------------------|------------|------------|
| Dépenses | 1 188,49 € | 1 866,80 € |
| Recettes | 1 891,62 € | 1 520,25 € |
| Excédent / Déficit | + 703,13 € | -346,55 € |

2018 2017

| | | |
|---------------------|-------------------|-------------------|
| Solde compte chèque | 1 065,58 € | 580,00 € |
| Solde livret bleu | 4 932,81 € | 4 896,09 € |
| Solde caisse | 0 | 0 |
| Total | 5 998,39 € | 5 476,09 € |

Rakonto

KIAM ILI BATALIS

Laŭlonge de la jardekoj la bretonoj ribelis kaj videblis obstinaj. Sendube ilia reputacio ne estas tute malvera.

La ruĝaj ĉapoj

En 1675, Francio militas kontraŭ la Unuiĝintaj Provincoj de Nederlando". Por financi siaj soldatoj, Louis XIVa bezonas monon. Li decidas krei novajn impostojn : sur la tabako, sur la stanaĵoj, sur la stampita papero.

Ribelo minacas. Rennes kaj Nantes protestas : la oficoj de la stampitaj paperoj estas rabitaj, la kastejoj ruinigitaj, ofte bruligitaj. La nobeloj estas atakitaj eĉ mortigitaj. La kolero rapide disvastiĝas : Dinan, Guingamp, Morlaix...

En la regiono "Le Poher", Sébastien Le Balp, notario, kaptas la ribelo-komandon. Li starigas armeon. Por grupigi la ribelulojn li surmetas ruĝan ĉapon kaj funkciigas la alarmsonoradon en la vilaĝo. La ribelantoj redaktas « Les Codes Paysans » (kamparanajn kodojn). Ili postulas la impost-nuligon kaj la servuto-abolicion.

La reĝa rebato ne malfruas kaj la subpremo falegas sur la landon. Sébastien Le Balp estas mortigita, la ribeluloj publike draŝitaj aŭ pendigitaj ĉe la vojarbojn, aliaj kondamnitaj al galerpuno.

La impostoj sur la stampitaj paperoj konserviĝis kaj pro sia ribelo, Bretonio devis pagi.

La bretonoj devis flankenmeti siajn ruĝajn ĉapojn.

Kamparaj manifestacioj en Morlaix.

Post la dua mondmilito, la bretona kamparo ankoraŭ vivas kiel en la XIXa jarcento.

Sed rapide alvenas la mekanizado, la traktoroj...

La agrikulturo baskulas en la XXa jarcento, sed la prezoj ne sekvas.. Necesos dek jaroj da kamparanaj luktadoj antaŭ ol stariĝos sistemo de akcia vendado de la legomoj. Dek jaroj da manifestacioj, el kiuj

plej impresa evento estas la preno de la subprefektejo de Morlaix, la 8an de Junio 1961. Sub la gvido de Alexis Gourvenec, 2000 agrikulturistoj invadas la urbon, per siaj traktoroj baras la vojon. Sed, vespere post la ordo pri disiĝo, Alexis Gourvenec kaj lia sam-movad-estro Marcel Léon estas arestitaj kaj enkarcerigitaj.

La postajn tagojn, ekas la solidareco de ĉiuj kaparanoj : voj-kaj-fervojoj baraj stariĝas, homamaso ĉie manifestacias, la agrikulturaj sindikatoj plias la streĉitecon. La proceso-tago, 5-6 000 luktantoj alfrontas 1500 ĝendarmojn. Finfine la du akuzitoj estas absolvitaj.

La du luktantoj estas portitaj en triumfo. "La batalo daŭras !" ili lanĉas al la homamaso.

Ĝi ankoraŭ daŭros kaj pli disvastiĝos al la defendo de la bretona ekonomio.



Rakonto (sekvo)

Le Joint Français" en Saint Briec.

La jaro 1968 ekkomencas sub malserenaj aŭspicioj en Bretonio. La laboristoj, la kamparanoj... ĉie regas maltrankvileco. La regiono sentas sin forlasita de Parizo kaj timas pro sia ekonomia pluvivado. La bretona Majo estas malkvieta. Tiam, kiam la unuaj vokoj al manifestacio ekas, tuj la bretonoj reagas : ĉirkaŭ 60.000 personoj surstrate manifestacias. Strikoj komenciĝas en la uzinoj.



Baldaŭ la laboristoj en " Le Joint Français", filio de la CGE (Generala, Elektra Kompanio) malkovros maljustecon inter ili kaj la dungitoj de Bezons, apud Parizo, ĝia ĉefestablo : la salarioj estas pli altaj je 25 – 30% ol en Saint Briec. Ili postulas salarian plialtiĝon sed la estroj ne akceptas. La laboristoj sentas sin humiligitaj kaj tuj strikas. Fronte al la parizaj kapitalistoj, la bretonaj laboristoj kontraŭstarigas 8 strikajn semajnojn kun la gvidmotivo " L'Ouest veut vivre" (Bretonio volas vivi).

Tiu lukto iĝas simbola, socia konflikto. Granda, regiona solidareco ebligas al la laboristoj malcedi. Unumonate poste, la salariaj traktadoj ĉiam stagnas. La 10an de Marto la lokoj estas okupitaj kaj la estroj ŝlositaj. Sed frumatene alvenas la policistoj por elpuŝi la ribelulojn.

Fine, la 8an de Majo, konsenta protokolo estas subskribita : la estroj konsentas salarian plialtiĝon po 65 centimoj/ hore (70 centimoj estis postulitaj) kaj jara kromdonaco de 325 frankoj. Post du baraktaj monatoj, finfine la laboristoj venkis.

Plogoff : ŝtonoj kontraŭ fusiloj.

En 1974 Francio penas restariĝi post la unua petro-la ekbato. La registaro kaj EDF volas plirapidigi la konstruadon de nukleaj centroj. La 12an de Septembro 1978, la CES (Comité Economique et Social) elektas Plogoff por starigi nuklean centron en Bretonio. Tiam, post multaj nigraj tajdoj la bretonoj malfermiĝas al regionista vekigo. Mobilizado tuj ekmoviĝis : manifestacioj ekas kaj ne plu ĉesos.



En 1980, la dosieroj pri la publika enketo alvenas al la urbodomo ; tuj ili estas bruligitaj. Tamen la nukleaj estroj decidas daŭrigi la enketon sed la urbodomo rifuzas malfermi siajn pordojn. Tiam la registaro decidas malfermi "alligitajn urbodomojn" en kamionetoj garditaj de la policistoj.

Fronte al la atoma energio, humura malespero subtenas la Plogoff-anojn. Ĉiuvespere, kiam la policistoj foriras, la sama scenario ripetiĝas : unue oni lanĉas insultojn kaj poste la ŝtonjetiloj eliras la poŝojn : ŝtonoj kontraŭ fusiloj !

La 16an de Marto 1980, 50.000 ribeluloj festas la enketofinon.

Unu jaron poste, François Mitterand, elektita Prezidento, anoncas, laŭ sia promeso, la nuligon de la projekto. Plogoff ne havos nuklean centron.

Pli facile cediĝi menhiron ol Bretonon !

Aliaj postaj luktoj pravigos tion.

Jeanne. Pluezek.

Fontoj : Le XXe siècle en Bretagne et dans le monde. Ed. Le Télégramme.

El la klubo de Vannes kaj el Aŭstralio

TEATRO EN VANNES

Nia ĉi-jara spektaklo estis prezentita dimanĉon la trian de februaro 2019 antaŭ cento da spektantoj, inter kiuj pli ol duono neesperantistoj. Tiuj ĉi estis allogitaj dank'al anonco de interrompo de tempo al tempo de la teatraĵo en esperanto por komentoj en la franca. Monkolekto dum la evento ebligis sendi finanĉan helpon al la asocio *Secours Populaire*.

Ĉiuj do spektis la reinterpretitajn aventurojn de famkonata kapuĉulino. Sub la plumo de Daniel Scourzic la ruĝaj vestaĵoj de la knabino verdiĝis dum neatendite sinsekvigis sursceneje plej diversaj personoj kiel Louis Pasteur, René Magritte, la 3 porkidoj, Bekasin, Heidi, la sep nanoj ... Amuzaj situacioj kaj replikoj senbride ridigis la aŭskultantaron !

Gratulon al Odyle, kiu starigis kaj enscenigis la teatraĵon, kaj ankaŭ al la tuta skipo !

Elinjo

Ĉu raporti kaj arkivigi gravas?

Mi estis esperantistino dum sufiĉe longa tempo por sperti ke mia memoro ne estas findida. Kiu staras sur tiu foto de antaŭ 30 jaroj? Mi eĉ foje demandas min ĉu mi vere renkontis tiun personon, kiu staras apud mi. Ni vivas la eventojn tagon post tago, ne pensante ke iam ni ne plu scios pri ili. Tiuj ĉiutagaĵoj aspektas ne sufiĉe gravaj por meriti raporton aŭ almenaŭ mencion en kluba revuo aŭ nuntempe kluba retejo. Sed aliflanke mi malesperas kiam en la radioprogramo 3ZZZ al kiu mi kontribuas, mi ne kapablas trovi informojn pri iu aŭstralia verkisto, kies verkon mi deziras prezenti. Foje danke al serĉado en Google mi trovas la nomon en la katalogo de la nacia biblioteko, kiu ricevis ekzempleron de la libro, sed nenio pli, alivorte neniu informon. Mi alte taksas la du volumojn de "Enciklopedio de Esperanto" eldonitajn en 1933 en Budapeŝto laŭ la iniciato de I. Ŝirjajev, kies redaktoroj estas L. Kökeny kaj V. Bleier kaj la lingvokontrolisto K. Kalocsay. Ĝi enhavas artikolojn de diversaj longoj pri la unuaj esperantistoj kaj esperanto-asocioj. Kvankam ĝi ne citas ĉiujn, ĝi estas valora fonto de informoj. Niaj posteuloj bezonos tiujn informojn, kiuj nuntempe malgrave aspektas, por kompreni la historion de la esperantistoj kaj Esperanto seninterrompe.

Kelkaj aŭstraliaj esperantistoj, kiuj ŝatas historion, komprenas la gravecon de ĉiu tipo de dokumento kaj provas arigi kaj ordigi informojn pri la nunaj membroj de la diversaj kluboj, asocioj kaj pri la eventoj lokaj aŭ pli granskalaj. Tio estas granda laboro. Ĉu ne estus pli simpla akiri la kutimon aŭtomate krei kaj teni dokumentojn? Ĉu via grupo faras tion?

Franciska, Aŭstralio

LA VERDA KAPUĈULINETO
LE PETIT CAPUCHON VERT
 Pièce de théâtre en Espéranto
 Commentaires en Français
 Entrée gratuite
 Une pièce de Daniel SCOURZIC
 Dimanche 3 février 2019 - 15 h
 Centre socioculturel Henri Matisse
 13, rue Emile Jourdain, Ménimur, Vannes
 En face de la piscine Vanocéa

Armor Esperanto

Alain Bournel, nova prezidanto de Armor Esperanto



Nia nova muzikema prezidanto

Sabaton la 8an de marto okazis la jarkunveno de Armor Esperanto. 32 personoj ĉeestis.

Matene okazis la jarkunveno kun la tradiciaj raportoj (pri aktivaĵoj kaj financaj) kaj la elekto de la nova administrantaro. Du novaj personoj kuniĝis kun la antaŭaj administrantoj. Ni ĝojis akcepti Andréa kaj Géry.

Post la komuna tagmanĝo, la administrantaro elektis sian estraron kaj jen la rezulto :

Prezidanto : Alain Bournel vicprezidanto : Laurent Peuch Kasisto : Jérôme Caré kasisto-asistanto : Jean-Claude Dubois Sekretario : Philippe Stride sekretario-asistantino : Murielle Caré

Katalin Kováts ĉeestos la Pluezekajn Renkontiĝojn en 2020

La anoj de Armor Esperanto ankaŭ konfirmis la projekton pri **Pluezekaj Renkontiĝoj de la 15a ĝis la 21a de aŭgusto 2020**. Nova teamo el Armor Esperanto-anoj kaj Plouezec Esperanto-anoj organizos tiujn renkontiĝojn **en tute renovigita festosalono de Pluezeko**. Ni baldaŭ dissendos pli precizajn informojn sed ekde nun ni scias, ke **Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge ĉeestos** !

Kaj posttagmeze, jen la amuzaĵoj .

En la komenco de la posttagmezo, ni skajpumis kun eksterlandaj amikinoj : Zsófi kiu plenumis

Civitan Servon antaŭ pluraj jaroj, Nijole kiu rondvojaĝis tra Bretonio pasintan jaron kaj finfine Katalin Kováts kiu reklamis pri « Ekparolu » kaj nova projekto, ŝi ankaŭ tuj pozitive reagis kiam ni invitis ŝin veni al Pluezeko en 2020.

Poste, kiel kutime, dum la posttagmezo, ĉiu klubo prezentis teatraĵojn kaj kantojn por plezurigi ĉiujn ĉeestantojn. Kompreneble, ni multe ridegis.

Vere estis bela momento kun gravaj decidoj.

Lorento Peuch



Komencintoj el Pleudaniel rolludas kaj ridigas nin.



La Fontaine kaj konataj fabloj

El la klubo de Guingamp

Dum la Ĝenerala Asembleo de Armor- Esperanto, la 9an de februaro 2019

Saluton, kara publiko,

Jen enigmo, divenaĵo. Bone aŭskultu, por trovi kiu mi estas.

Certe vi konas min. Mi povas diri al vi, ke mi estas fama franca verkisto el la deksepa jarcento.

Mi naskiĝis la okan de julio mil ses cent dudek unu, en Château-Thierry.

Mi multe verkis: romanojn, teatraĵojn, poemojn.

La plej grandan parton de mia verko, mi ne volas diri, por ne tro helpi vin.

La nura indikaĵo, kiun mi donas al vi, estas ke mi multe skribis pri bestoj.

Mi atendas viajn proponojn...

Nun vi scias, ke mi estas Jean de la Fontaine.

Kun la klubo de Guingamp, ni prezentos al vi du fablojn.

Mi certas, ke vi tuj rekonos ilin.

Niaj aktorinoj devas kostumigi sin. Dumtempe, mi povas aldoni kelkajn informojn pri mia vivo.

Mi multe verkis, bedaŭrinde mi ne multe gajnis monon.

Mi ne tro vizitadis la reĝkortegon. En miaj fabloj, mi kritikis riĉulojn, posedantojn, pro tio la reĝo ne tro amis min.

Sed mi vizitadis la salonojn de Madame de la Sablière, la Duchesse de Bouillon, kaj la Duchesse d'Orléans.

Ili protektis verkistojn kaj artistojn. Ili havigis al mi monon. Mi devas konfesi ke, kelkfoje, mi transiris de la salono ĝis la dormĉambro de mia gastigantino.

Por danki ŝin, mi ofte verkis poemojn honore al ŝi.

Kelkaj diras, ke mi estis senatenta. Estas vere ke, iufoje, mi forgesis deklari mian nuran infanon. Sed, ne gravas, ĉu ne?

Mi verkis mian propran tomboskribon:

Jean foriris kiel li venis,

Manĝinte sian tutan monon,

Pensite ke posedajoj ne gravas,

Sed gravas bone uzi tempon:

Unu duonon por dormi, la alian por fari nenion!

Nun, divenu kiu rolludas Jean de la Fontaine!

« Unu tago en la nokto »

Vendredon la 25an de januaro, ni partoprenis en tago organizita por blindaj personoj, de asocio « Vidi Kune » en Ploufragan.

Matene okazis prezentado de asocioj per « ronda tablo » kies temo estis « inkludo de blinduloj kaj malbonvidantuloj dum ĉiuj agadoj kaj aĝoj de la vivo ». La partoprenantoj parolis precipe pri lernejoj por infanoj, sportoj, bibliotekoj, ktp...

Poste ni manĝis kune en granda ĉambro. Ni estis multaj. Niaj najbaroj estis blindaj, pro glaŭkomo, aŭ ekde naskiĝo. Ni havis malvarman manĝon sur pleto: la najbaro de Francis palpis per fingroj por scii kio estis la manĝo, do Francis klarigis al li kaj diris kion li devus manĝi unue. Ni manĝis en bona etoso, parolante precipe pri problemoj de blinduloj, sed ili estis agrablaj, obstinaj, ili ne plendis.

Posttagmeze ni vidis filmon dum tri kvaronoj, kies la titolo estis « unu tago en la nokto » kaj ĝi rakontis vivon de juna blindulino, kiu ĉeestis kaj klarigis la filmon, kaj respondis post la filmo al la demandoj.

Oni vidis ŝin prepari manĝon por siaj infanoj, ŝi faris kukon sen meti ovoŝelerojn en farunon !

Post la filmo mi demandis al ŝi kia maniere ŝi povas rompi ovojn sen faligi ŝelerojn. Ridante, ŝi respondis ke ŝi rompis multe da ovoj antaŭ ol sukcesi ! Ŝi rompas ilin per nur unu mano...Mi admiris ŝin !

Ni vidis ŝin iri en restoracion, urbodomon, poŝtoficejon...kelkfoje homoj ne estis tre ĝentilaj, eble ili opiniis ke ŝi bone vidas, kvankam ŝi havis blankan lambastonon !

Ŝi iris ankaŭ ĉe beligistino por fari konstantan ŝminkon de la okuloj ;

Ŝi estis eleganta, pimpa : ŝi elektis siajn vestojn dank'al aparato, kiu diris al ŝi la kolorojn.

Tiu filmo estis leciono de kuraĝo kaj persisteco.

Post la filmo ni vizitis budojn pri ilaroj por malalta vidado. Plaĉis al ni aparato por televido, kiu ebligas elekti filmojn, librojn, gazetojn...per voĉo.

Estis interesega tago.

De tiu tago, mi eksciis ke animantino de Arte, Elisabeth Quin, kiu prezentas vespere elsendon « dudekok minutoj », estas preskaŭ blinda pro glaŭkomo. Ŝi verkis libron « nokto leviĝas »

Mia venonta legado estos libro de Hélène Jousse "la manoj de Louis Braille"

Martine, klubanino de Guingamp

El niaj kluboj

Armor Esperanto videbla surstrate en la urbo



Nia asocio plurfoje partoprenis la grandan foiron Biozone, tamen estis nova sperto en la bazaro de Saint-Brieuc. Sabaton la 2an de marto, Amapola, Laurent, Jérôme kaj Alain preparis budon en tiu bazaro.

Malvarmiĝis, tamen ili ĝoje babilis pri Esperanto kaj disdonis flugfoliojn pri la prelego de Ĉielismo, esperantisto de Xi' An.

Buntajn bildstriojn ŝatis infanoj, kelkaj vizitantoj tuj parolis pri siaj vojaĝoj aŭ spertoj en Ĉinio, dum aliaj petis informojn pri la lingvo : ekzemple, iu paro de junuloj interesiĝis ĉar ili kutimas vojaĝi en la

LA EŬROPA KONSUMANTO

Ĉu la kreado de la Eŭro malmergis eŭropan konsumanton? Ne, respondas la industriistoj. La diverseco de la kulturaj kutimoj kaj kondutoj ene de Eŭropa Unio preskaŭ nebligas la lanĉadon sur la merkaton de unika produkto; ekzemple Germano ŝatas sian kafon malpli amara ol Italo, Franco kaj Nederlandano ne ŝatas samspecajn fromaĝojn...


Krome la fiska leĝaro tre varias laŭ la lando, same kiel la kosto de la manlaboro. Eĉ la aŭtomobilaj fabrikistoj devas kalkuli kun la aldonvalora takso je 17% en Luksemburgo aŭ je 19,6% en Francio, kio malebligas la enlokigon en la tutan Eŭropon de unikaj tarifoj inkluzive ĉiujn taksojn ;... sed pri tio la industriistoj neniel volas, ĉar ĝi malebligus modifi la prezojn por akceli la penetradon de tia aŭ alia marko sur nacian merkaton.

Nur industriistoj pri elektronikajoj por vasta publiko pli malpli uniformigis siajn produktojn kaj difinis katalogon de eŭropaj unikaj prezoj sentaksaj; sed eĉ en tiu sfero la industriistoj rezignis estigi unikan eŭropan prezon inkluzive ĉiujn taksojn por vasta publiko, ĉar ili estus devigitaj kompensi la elspezadon en iuj landoj per enspezado en aliaj kaj tiu operacio montriĝus tro malfacila kaj delikata.

Ankaŭ en la lingvistika kampo, la politiko de normigo kaj uniformigo per la angla-usona sendube povas nur esti kondamnita al fiasko, same kiel en la industria kampo. Kontraŭe Esperanto povas ludi sian rolon kiel internacia lingvo, kiu respektas la diversecon de la naciaj lingvoj.

Josette Ducloyer

Anonco



INSTRUISTA TREJNADO

en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI ree kune organizas unujaran **instruistan trejnadon** kun la kontribuo de Edukado.net, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 14-20.09.2019, la dua 01-07.02.2020) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2020. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro.

Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl.

El la Programo

Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Ilona Koutny, Zsófia Kóródy):

Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)

Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizado kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.)

Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj)

Esperanta kulturo (Tomasz Chmielik, István Ertl, Ilona Koutny):

Tiklaj punktoj de e-gramatiko

Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de e-literaturo

Plej gravaj eventoj de la historio de esperanto

Lingva trejnado (per testoj)

Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj.

Vojaĝo al Ĉinio

Turismaj vidindaĵoj en Ĉinio

Ni vizitis tre famajn ĉinajn vidindaĵojn en Siano/ Xi'an (« Terakota armeo », muregojn, muzulmanan kvartalon ktp), sed certe vi povis-os ĝui tiujn vidindaĵojn danke al la prelegoj de nia amiko Ĉielismo. Ankaŭ en suda Ĉinio ni miris belegajn lokojn en Yangshuo, Guilin ktp. Sed, pri tiuj vidindaĵoj, eblas trovi multajn bonkvalitajn dokumentojn per reto. Do, ni preferas prezenti al vi kelkajn ne tiel konatajn vidindaĵojn.

Antikva bieno de iamaj riĉuloj.

Laŭ la konsiloj de amiko de Sanoza, ni veturis kelkajn dekojn da kilometroj norde de Nanchang por atingi etan vilaĝon apud kiu troviĝas malnova bieno. Ĉu eblis viziti ĝin? Fakte jes, kvankam neniu vizitanto atendis ĉe ĝiĉeto. Tiu historia konstruaĵo estis forlasita dum pluraj dekoj da jaroj post la Revolucio. Sed nuntempe la registaro konscias pri la valoro de la restaĵoj de la pasinteco kaj ekrenovigas ilin por valorigi tiujn historiajn riĉecojn.

Miraklo! Ni estis la nuraj vizitantoj!




Post la amasoj da vizitantoj (ĉefe ĉinaj) kiujn ni renkontis en aliaj antaŭaj vizitoj, pro la ferioj de la 1a de majo kaj pro la fameco de tiuj lokoj, ni ĝuis la kvietecon de la vizito.

Do, post kelkaj minutoj, ĉiĉeronino venis por



gvidi nin tra la konstruaĵo kaj Sanoza tradukis al esperanto. La konstruaĵo similas al eta « Malpermesita urbo » de la ĉinaj imperiestroj. Ĝi konsistas el aroj de multnombraj kaj diversaj ĉambroj apartigitaj de belaj skulptitaj lignoseptoj.

Altaj muroj el ŝtonoj kaj brikoj ĉirkaŭas ĉiun ĉambraron. Inter la muroj de la diversaj partoj, stratetoj ebligis la transiradon de la loĝantoj kaj ĉevaloj. Tiuj pasejoj ankaŭ ludis gravan rolon por lukti kontraŭ la incendioj.



Vojaĝo al Ĉinio (sekvo)



En la plej grandaj ĉambroj, internaj kortetoj ebligis alporti lumon kaj provizi la komunumon je pluvakvo per grandaj terkrucoj.



En tiu epoko pro la multaj lignaĵoj, oni timis la incendiojn. La akvorezervujoj kaj la altaj muroj el brikoj celis protekti de la fajro.

Tri riĉaj fratoj venintaj de alia ĉina regiono posedis tiun bienon. Ili kaj iliaj posteuloj regis vastan teritorion en la centro de Ĉinio de la komenco de la 19a jarcento ĝis la Revolucio ; poste, la familio fuĝis al Tajvano.

La fratoj havis ankaŭ plurajn konkubinojn kaj multnombrajn infanojn.

Ni vizitis la internan klasoĉambron de la infanoj.

Ni konsilas tiun interesan viziton al estontaj vojaĝantoj en Ĉinio.

Amapola kaj Lorento (Saint-Brieuc)

El niaj kluboj

Diversaj Arboj

Post tago en lernejo, ĉiutage mi zorgis pri nia ĝardeno : rafanoj, karotoj, fazeolujoj, pizujoj laŭ la sezono sed mi ne nur laboris mi ŝatis iri sur la arbojn :

la plej alta en la ĝardeno estis magnolio pro ĝia rekta trunko kaj ĝia abia fizonomio pli alta ol la tegmento de la domo (kvazaŭ dek metroj) . Tiu arbo donis grandajn blankajn citronobonodorajn florojn dum majo kaj tro multe da grandaj larĝaj dikaj folioj kiujn mi devis bruli dum junio.



Sed la plej agrabla arbo estis Judas arbo: sur ĝia larĝa trunko vestita de musko oni povas ripozi : estis agrabla florita nesto sub suno



Aliflanke mi ŝatis kunporti al la lernejo melolontojn por mia skribkesto , do mi iris sur kverkojn proksime de la domo en la kamparo por kapti ilin.



René, Lannion

El niaj kluboj

TAMARIKO

Mi estis ankoraŭ knabino.
 Mi iris ĉe miaj geavoj
 post la lernejo kaj dum la ferioj.
 Mia avo estis ĝardenisto.
 En la ĝardeno, granda tamariko
 provizis simpatian ombron dum somero.
 Sub tiu arbo, mi multe ludis kaj manĝis kukojn .
 Mi amis mian avon kiu estis bona por siaj nepinoj.
 Tamariko kun somera suno pensigas min pri li.

Annie



TILIO



Bildo ofte revenas en mian kapon.
 Krioj de infanoj disiĝas samtempe inter miaj oreloj.
 Tiam arbo aperas, ne iu malgranda, sed grandega trunko superita de branĉoj, kiuj tre altiĝas en la ĉielo. Ĉi tiu arbo estas la reĝo de la ludejo.
 Ĉio okazas ĉirkaŭ ĝi, la ludoj, la sablujo, la kuroj, kaj kelkfoje la punoj.
 Neniu grimpas, estus sakrilegio. Subite fajfo, silento, kaj ĉiuj tiuj belaj geknaboj reiras al la klasĉambro.

Claude, Lanion

Vojaĝo al HINDIO

Raporto de Jean-Yves

La 4-an de februaro, aviadilo surteriĝas en Delhio. Ĉe la flughavena elirejo, ni renkontas Abhi-n, kiu franclingve gvidos nin kaj Surondra-n, kiu veturigos nin. Ĉio estas planita.

Oficialaj lingvoj de "Hindio" aŭ "Hinda Unio" aŭ "Bharato", *se rigardi la hindi-lingvan nomon, estas la hindi-lingvo kaj la angla.*

Hinda Unio konsistas el 29 ŝtatoj. Ni pasigos la du proksimajn semajnojn veturante ĉefe tra Raĝastano. La planita itinero portos nin okcidenten kaj suden de Delhio.

Duan tagon, ni iom veturas en Delhio. Tiun urbejon ek-konstruigis maharaĝo, kiu decidis transloki la ĉefurbon el Agra al tiu ĉi loko.

En la urbo, ni ĉirkaŭ-veturis la Ruĝan Fortreson, sur kiu flirtis la unua nacia flago post sendependiĝo en 1947.

Ni vizitis la Grandan Moskeon, ankaŭ ĝi estas ruĝa pro abundeco de tiaj grejs-ŝtonoj en la regiono.

Poste oni gvidis nin al Templo de la Sikh-anoj, kiu estis por ni la plej riĉa kaj brila monumento. Granda kvanto de oro, marmoroj kaj eburajoj, ĉio el tio fajne ellaborita.



Trian tagon, ni veturas al alia urbo, nome Mandawa. Survoje niaj akompanantoj surprizas nin per invito de la stiristo en sian familian domon kaj regalas nin per diversaj ege bongustaj pladoj. Tre kortuŝa sperto pro la ege simpatia akceptado fare de ĉiu familiano. Fakte la familio vivtenas sin per agro-kulturado. La regiono certe kongruas por tio. Videblas kampoj de tritiko, kolzo, pizoj, kikeroj, k.a...

Trafinte Mandawa-n ni komprenas, ke la urbo kuŝas ĉe la famkonata t.n. vojo de la spic- kaj silk komercado. Ve! Ĝiaj riĉaĵoj ege velkis...

Ni tranoktis en eks-maharaĝa palaco. Poste ĝi estis uzita de la koloniista administracio kaj nun aranĝita en hotelo.

Kvaran tagon, ekiro al Bikaner, ankaŭ ĝi ĉe la komerca vojo. Post tag-manĝo, per tuk-tuk-veturilo oni promeniĝas nin tra la urbo. Ankaŭ tie videblas imponaj konstruaĵoj t.n. "haveli". Ankaŭ tie tempopaso postlasis spurojn.

Poste, ni vizitis templon t.n. Karni Mata. Apartaĵo de tiu loko estas, ke ĝi ŝirmas grandan nombron da ratoj... Jes, jes... Ne miru, mi skribis ratojn. La tieaj fideluloj nutras ilin per diversaj manĝaĵoj kaj lakton en larĝaj teleregoj. Fakte la homoj rigardas ilin, kiel reenkarniĝojn de la mortintoj. Plie, ĉiuj ege atente provas ekvidi la blankan raton, kiu donus dumvivan feliĉon al la vidinto. Tiu blankulo "estus" reenkarniĝo de la tiea kultita dio. Fine, la loko estas konata ankaŭ kiel "templo de la ratoj". Sekvantan nokton, ni trapasos en impona konstruaĵo, kiu iam ŝirmis kavalerianojn.



Resume estas mirinde bela loko!

Ankaŭ alia apartaĵo tiris nian atenton, nome najbare de tiu Templo kuŝas vasta salonego, en kiu oni ĉiu-tage akceptas homojn – *miulojn da homoj* – kaj distribuas por ĉiuj senpagan manĝon. Ĉio funkcias dank' al sindonemo de multaj homoj, kiuj donacas varojn, preparas, kuiras, distribuas manĝaĵojn, ktp... Dum pilgrim tagoj povas estis disdonitaj pli ol dek-kvin mil tiaj manĝoj.

Vojaĝo al HINDIO (sekvo)

Vespere, orkestro kaj dancistinoj distras nin sub la altaj arboj de la interna korto.

Kvinan tagon, post longa veturado, ni trafas Jaisalmer, krom-nomita "la Ora Urbo" pro la flavkoloraj ŝtonoj el tiu regiono. Jaisalmer kuŝas ĉe-lime de la Thar-dezerto. Ni malkovras la hotelon kaj tag-fine estas liberaj.

Sesan tagon ni vizitas la vastegan fortreson, ankaŭ reĝan palacon de la urbo. Konstruita en 1156, por ŝirmi proksimume 2000 homojn, nun preskaŭ 6000 restadas en la loko. Malgraŭ postuloj de la administracioj neniu deziras transloĝiĝi, ĉar tiea restado donas rajton komerci dank' al turismo ene de la konstruaĵo.

Poste ni vizitas personan muzeon starigitan de iu sinjoro, kiu tutan vivon kolektis tre diversajn ilojn kaj objektojn, kiuj ĉefe utilis al familiaj vivoj en dezerto. Tre interesa malkovro!

Posttagmeze, ni veturas al la dunoj Sam, 50-km-ojn for en la dezerto. Per ĉaro tirata de dromedaro, oni veturigas nin tra la sablaj dunoj. Tie, ni sidadas dum kelkaj minutoj kaj atendas sunsubiron. Tiam lumoj rapide ŝanĝiĝas, ĝis la sun-disko falas post fora nubeto. Ĉi tie, turismo floras, ĉar turism-agentoj starigis tre multajn tendo-vilaĝojn.



Sepan tagon, veturado kondukas nin al Jodhpur, krom-nomita "la Blua Urbo", ĉar granda parto el ĝiaj domoj estas blu-farbitaj. Laŭdire tiu koloro iom reflektas sun-radian varmecon kaj ĝi iom forpuŝas ankaŭ muŝojn kaj aliajn insektojn.

Okan tagon, ek! Al aventuro... Atendas nin ĵipo, kiu portos nin al vizitindaj lokoj. Unue, ni haltas en pot-farejo. Unua potisto prezentas sian far-teknikon. Li per ligna batilo ekstere frapas la ter-

mason per la dekstra mano, dum la alia mano interne tenas formilon; sekve per longa kaj sperta batado li ege sukcese elformas ter-kruĉon.

Antaŭ ni potisto fabrikas eble sukerojn kun kovrilo; per alia manpleno de tero li ellaboras longkolan karafon, li eĉ dekoracias ĝin per diversaj strietoj. La tuto elfarita en 15-minutoj per incirada tornilo.

Dua vizit-loko konsistas el vilaĝo de Biŝnoĵ-anoj.

La Biŝnoĵ-viv-reguloj resumiĝas jene:

"Perfekta unuiĝo inter Homo, Besto kaj Naturo."

"Amu la bestojn. Ne dehaku verdajn arbojn. Tiel vine ne konos malfacilaĵojn en la vivo."

En 1845 kaj en la urbo Mukam, tiu penso-fluo elpensita de la Guruo Jambeshwar Bhagavan, konstituas bazon de la "Biŝnoĵ-hindua" sekto.

Kompreneble, ankaŭ en tiu urbo estas impona fortreso kaj reĝa palaco, nun granda parto el tio enhavas muzeojn kaj eksponejojn. Ni vidis preskaŭ la tuton.

Ni vizitas ankaŭ Jaswant Thada-on. Temas pri reĝa cenotafo konstruita de Maharaĝo Sardar Singh memore al sia patro. La tuta konstruaĵo konsistas el marmoro mirinde fajne pri-tajlita kaj grifelita.

Apud tio staras lokoj, sur kiuj oni praktikis kremaciojn.

Naŭan tagon nia veturado celas Udaipur-on, sed survoje ni vizitas templon dediĉitan al Ĝainisma religio. Plej granda tia templo en la mondo. Ankaŭ tie marmoro estas ĉie kaj same prilaborita, mirindaĵoj...

Fine ni trafas la hotelon, el kiu ni ĝuas plenkoloran sunsubiron sur lago.

Dekan tagon, ankaŭ tie staras templo kaj palacoj tre malnovaj, kaj egale prilaboritaj. Du-trionoj el la palacego ŝirmas divers-temajn muzeojn kaj lernejon. En la cetera parto de la palaco plu loĝas maharaĝo "reĝo".

Atendas nin ŝipo por navigado sur la lago Pichola. Ni elŝipiĝas sur insuleton okupatan de ege luksa hotelo.

Post manĝo en eta restoracio, Abhi, la gvidisto proponas ekster-programe montri al ni etan muzeon. Li gvidas la stiriston ĝis sufiĉe granda domo, invitas nin elaŭtiĝi kaj bonvenigas nin en propran hejmon

Ni ekkonas lian edzinon kaj baldaŭ envenas lia patrino. Ambaŭ sinjorinoj invitas Marie al najbara salono. Post kelkaj minutoj revenas virina triopo

Vojaĝo al HINDIO (sekvo)

same vestitaj. Mi ne estu ĵaluza, oni surmetas al mi turbanon kaj enmanigas sabron. La tuto laŭ simboloj de la familia "religio".



La edzino, Honny jam kuiris por ni tre lokajn bongustajn manĝaĵojn. Bonvolu permesi, ke mi rezignu pri priskribado de la tiama emoci-plena etoso. **Dek-unuan tagon**, survoje ni vizitas Chittorgarh-fortreson. Fakte ĝi okupas supron de monteto. Staras diversaj temploj, pilgrimejo, ankaŭ reĝa palaco. El tiu supro ni ĝuas vastegan panoramon.

Fine ni trafas la hotelon.

Dek-duan tagon, antaŭ ol ekveturi al la sekvanta etapo, la urbo Jaipur, en Bundi mem ni ekrigardas la lokan fortreson, eble la malpli brila el niaj antaŭaj vizitoj. Fakte dum tempo ĝi estis oficiale iom forlasita kaj okupita de simioj. Poste, ni marŝas tra la urbo ĝis la flor-bazaro kaj la somera ĝardeno de la reĝino.

Kaj ek al Jaipur, kie ni tranoktos du-foje.

Dek-trian tagon, Jaipur, pli ol tri-milionoj da loĝantoj, estas ĉef-urbo de Raĝastano. veturado tra la urbo portas nin antaŭ la t.n. Palaco de la ventoj. Temas pri alta, konstruaĵo, kies fasado estas tute sen-fenestra. Fakte simil-aspektaj fenestroj konsistas nur el ĵazulioj, kiuj ebligis al reĝinoj kaj principinoj spekti parad-marŝadojn kaj aliajn festojn. Ni veturas ĝis la fortreso Amber, videbla de malproksime pro ĝia situo ĉe monteta supro. Pied-irado al tiu loko certe estus peniga, tial elefanto portos nin ĝis la tiea interna placo. Poste, longa marŝado dum vizitado gvidas nin laŭ kelkaj ŝtuparoj al kelkaj etaĝoj.

Reirante al la urbo ni trafas Jantar Mantar, temas

pri astronomia observatorio. Tie videblas pluraj iloj kapablaj orienti sciencistojn pri preciza situo de la steloj. Eblas ankaŭ sekvi precizan horon dank'al la suno mem.

Ĉar en la urbo kuŝas la plej granda kinejo – tre bela salono - el Raĝastano, nia programo planis por ni spektadon de Bolliŭda filmo. Laŭ Abhi, temas pri vivo de la nacia "Johano de Arko" (*tiel*)...

Dek-kvaran tagon, oni gvidas nin ĝis Agra – eksa ĉef-urbo de la lando. Survoje ni vizitas nacian naturan parkon, t.n. Keoladeo Ghana. Oni veturigas nin per rikiŝo sur vojo, kiu iras tra vasta marĉo, en kiu kviete vivas multaj bestoj, birdoj, inkluzive migrantaj birdoj, kiuj ĉi tie nestas.

Poste ni trafas la hotelon.

Dek-kvinan tagon, ni pasigas ĝin en Agra. Urbo fam-konata pro sia tutmonde konata monumento t.e. la Taj Mahal, unu el la unuaj tutmondaj here- daĵoj agnoskitaj de Unesko. Ne necesas esti altvalora spertulo por konstati, ke tiu konstruaĵo estas mirinde belega. Ĝi konsistas nur el marmoro kaj ĉiu parto, de malsupre ĝis la kulmino, estas treege fajne pri-skulptita. Maldekstre de la centra konstruaĵo staras moskeo. Dekstre por ekvilibri la tuton staras sam-aspekta konstruaĵo uzata, kiel akceptejo. Ankaŭ en tiu urbo staras Ruĝa Fortreso. Ĝi estas tre vasta, sed post vizito al la antaŭa monumento estas malfacile trovi belajn ĉi tie...

Poste ni veturas al la alia flanko de la rivero Yamuna. De tie, ni denove frontas al Taj Mahal videbla sub alia lumado kaj ebligas vidi la belan ensemblon.

Dek-sesan tagon, ni veturas al Delhi kaj precize en proksimeco de la flughaveno. Sekvantan tagon ni reflugos al Parizo.

Por ne ripeti ĉiu-foje, mi resumas tiel : Fortresaj muzeoj prezentas armilojn, ĉiutagajn ilojn, ekipaĵojn por ĉevalo aŭ por elefanto.

En reĝaj palacoj videblas luksaj riĉaĵoj uzitaj de la regantoj. Seĝoj, tabloj, litoj, portataj seĝoj, paradkaleŝoj, ĉio tio el arĝento kaj foje el oro.

Ĉu mi atestu, ke bovinoj estas ĉie, ĉe la kamparo ĉe en urboj...

Se io estas iom tikla por eŭropanoj en tiu lando, certe temas pri veturado en urboj.

Tamen ni konservos ne forgesblan memorajn pri tiu vojaĝ-sperto.

Jean-Yves

Poezio tut'libera

Printempe okazas konkurso « **Poésie en liberté** » : nur junuloj inter 15 kaj 25 jaroj rajtas partopreni.

La poemo estu verkita franclingve aŭ **esperantlingve**.

En 2019, eblas partopreni ĝis la 1-a de aprilo.

Pasintjare, junulino el Svedio, Ingrid Belgrund verkis belan poemon : **La devoj de la vivo**.

Hodiaŭ mi proponas enigmon.

En tiu teksto du verboj mankas. Legu, cerbumu kaj trovu ilin !

(Solvo en la retejo poesie-en-liberte.fr)

Murielle

La devoj de la vivo

En la vivo
estas nur du
devoj.

La unuan
vi konas.
Kvankam nenion
ni scias.
Nur ke ĝi okazos
Neniu eskapas ĝin.

La duan
vi faradas.
Konscie aŭ ne.
Eĉ ne fari ĝin
estas fari ĝin.
Neniu evitas ĝin.

Unu evidenta, unumomenta
La alia enombra, konstanta.
..... kaj
– la devoj de la vivo

INGRID BELGRUND, Sundsvall, Svedio

Participez au concours Poésie en liberté/Poezio tut'libera !

Poesie en liberté est un concours de poésie en langue française créé en 1998, mais pour la deuxième fois en 2019, il est possible d'écrire aussi des poèmes en espéranto.

Thème et forme libres, avec un maximum de 30 vers ou lignes

Participation gratuite

Ouvert à tous les jeunes de 15 à 25 ans de tous pays


Participation uniquement sur internet www.poesie-en-liberte.fr jusqu'au 1er avril 2019 (jusqu'au 30 avril en espéranto)

Le jury se réunira en mai pour désigner les lauréats, dans chaque catégorie, selon les pays et les niveaux d'étude. Les lauréats seront invités 3 jours à Paris en novembre, et leurs poèmes sont édités et diffusés par les éditions Bruno Doucey.

En novembre dernier, 40 lauréats sont venus à Paris. Parmi eux deux lauréats pour l'espéranto. Le 22 novembre, les prix ont été remis lors d'une grande cérémonie à Issy-les-Moulineaux.

Claude

Agendo 2019


12 au 16 avril
 Rencontre de la chorale
Interkant'
 à
Grésillon.

Turneoj 2019
 La ĉina esperantisto Ĉielismo
 prelegos en Bretonio
 de la 11-a de marto ĝis la 7-a de aprilo
 kaj la germana esperantisto Rainer Kurz
 de la 12a ĝis la 25a de majo



**71ème Congrès de
SAT-Amikaro**
 20/04/2019
 23/04/2019
 à MONTLUÇON





**104-a UK
Lahti
Finnlando**
 20-27
 07/2019

Agenda 2019 de Grésillon : gresillon.org/agenda

- ★ 12-16 avril Rencontre Chorale d'Interkant avec Zdravka Bojčeva + LandArt Nathalie Dubrulle
gresillon.org/chorale
- ★ 26 avril-03 mai 9-a PRINTEMPAS , cours intensifs avec Pšemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut puis 03-04 mai KER ekzamenoj
- ★ 28 avril-04 mai 2-a Migra semajno avec Olivier Buisson
gresillon.org/printempas
- ★ 18 MAI 14h Assemblée Générale des sociétaires
PROGRAMME D'ETE *gresillon.org/ete*
- ★ 08-18 juillet 3-ème cours Maraton d'Espéranto avec Denis Keefe et Marion Quenut
- ★ 08-18 juillet 5-ème Échanges de savoirs et de savoir-faire
- ★ 06-16 août 9-ème semaine festive pour enfants et familles
- ★ 06-16 août 2-ème semaine internationale de danses trad et cours d'Espéranto
- ★ 26 octobre-3 novembre 8-ème AÛTUNE les vacances Espéranto